

& Kiel fariĝis la blanka homo?:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 594 paŝoj dum 7 minutoj. Negran fabelon poemigis Julio Baghy (Ĉielarko, 1966). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo modifita de Balado de Greto.>

(#Melodio:

(#4413. Grettis kvæði: (<:33> /La3La LaaLaMi SiSiSi La3Ti; doodoTi do3Ti LaSo; TiTiTi Ti3Ti TiTi do3do; doodoTi do3Ti LaSo;

(#Rekantaĵe: Ti TiMi Si La; LaLalTi doTi LalSo; Ti TiTiTi Ti do; dodoTi dodoTi La;So Ti TiMi Si La a)

)×18)+

(&Strofoj:

'1 /Kiam la Temp' ne havis nomon, ;
komencon, fazojn, finon, ; la Dio kreis
- nigran homon ; dirante la destinon:

(×:; **Nun falas frostoj ; sur la2 larĝa
fjordo ; jen kuŝas kampulo ; en tero
malhela morta ; Nun falas frostoj.**)

'2 "Al vi la bestojn kun ĝangaloj ; mi
donas nun donace, ; eĉ riĉon de la
montoj, valoj ; por vivi bone, pace.

'3 La paradizo de l' tropiko ; al negroj
apartenas ; ĝis fraton frate en kunligo ;
la buŝo, koro tenas".

'4 Du fratoj foje en la valo, ; kiel ebono
nigraj, ; ĉasadis kune en ĝangalo ; sur
vojoj spure tigras.

'5 Ĝemeloj ili, sed interne ; du malaj
mondoj estis ; ĉe unu noblo en li ferme
; kun bona volo nestis ;

'6 ĉe dua ruzo kaj avido ; superis ĉiun
senton, ; li pagis fidon per perfido, ;
neniam havis penton.

'7 Rivaloj estis la ĝemeloj, ; knabinon
saman volis, ; sed ŝi dum svataj
amkveroj ; nur ridis kaj petolis:

'8 "Mi ne elektos, sed vi sciu, ; ties
edzin' mi estos, ; kiu en ĉaso venkos,
kiu ; per tigrifel' min vestos!"

'9 Kutimo estis tiapreze ; akiri la
amŝancon; tial la fratoj ĝangalmeze ;
ĉasante tenis lancon.

'10 L' unua brave kaj ĉasarde ; inter
lianojn paŝis; la dua ruze, tre singarde ;
post frata korp' sin kaŝis.

'11 Subite ega tigro saltis ; sur dorson
de la dua... ; Je helpokri' sinturne haltis
; lin savi la unua

'12 kaj li per lanco, sed batale ; la
tigrokoron trafis, ; gajninte ŝancon eĉ
lojale ; la fratan vivon savis.

'13 Sed danka sento en animo ; de l' dua
fate dormis; instige lin al aĉa krimo ;
ĵaluzo murda ŝtormis.

'14 Dum senfeligis sian predon ; la
ŝancgajninta frato, ; la dua planis jam
rimedon ; ĝin ŝteli sen kompatato

'15 kaj postrestante tuj krulele ;
mortpikis li per lanco ; kaj sinvestinte
tigrofele ; jubilis pro l' amŝanco.

'16 Li hejmeniri sin preparis ; sen
pento, sen riproĉo, ; kiam mem Dio
vojon baris ; kaj tondris Lia voĉo:

'17 "Aĥ, kion faris al la frato ; ci, aĉa
kaj maldanka?!" ; Li sen respond' kun
timtremado ; paliĝis krete blanka.

'18 "Por puni stigme perdu signe ; la
nigron de l' ebono!" ; Dum tion diris Di'
indigne, ; fariĝis - blanka homo.)